- *Phillip Sonntag* mahnt an, dass über die angefragte Unterstützung der Berliner Esperantogruppe für Veranstaltungen zum 100. Todestag von Zamenhof noch eine Antwort aussteht. Der Vorsitzende möchte den Todestag von Zamenhof nicht als Jubiläum, sondern als Gedenktag verstanden wissen und merkt an, dass das Gedenken auch in anderen Städten stattfinden soll. Die Frage nach dem Stimmungsbild zeigt, dass die Teilnehmer Gedenkveranstaltungen zum 100. Todestag von Zamenhof befürworten.

Abschluss der Veranstaltung

Um 17:05 schließt der Vorsitzende die Versammlung.





Ĉiutage 30 homoj finas la Esperanto-kurson ĉe Duolingo

Antaŭ kelkaj monatoj kreiĝis nova Esperanto-kurso por angleparolantoj ĉe *duolingo.com*. Ĉar Duolingo (<https://www.duolingo.com/>) nuntempe ŝajne estas la plej furora reta lingvolernejo, ankaŭ la Esperanto-kurso ekhavis furorajn aliĝonombrojn. La kvanto de registritaj eklernantoj en la anglalingva reta Esperanto-kurso ĉe Duolingo jam superis 300.000 homojn. Finstudas ĝin nur malgranda parto de ili, sed eĉ tiel ĉiutage ĉ. 30 homoj atingas la finon de la kurso. La kurso nun havas proksimume 325.000 lernantojn kaj 5.000 homoj aktive lernas ĉiutage. Ĉi-jare laŭplane estos lanĉita kurso por hispan-lingvanoj. En postaj jaroj estas planataj kursoj interalie por ruslingvanoj kaj ĉinlingvanoj. Pli detale vi povas legi en la intervjuo kun Chuck Smith, la gvidanto de la Esperanto-teamo por la Duolingo-kurso, ĉe

<http://www.liberafolio.org/>

Medicinaj instru-filmetoj en Esperanto

La retejo de “Khan Academy” (www.khanacademy.org) enhavas multajn centojn de sciencaj, edukaj kaj instruaj materialoj por libera klerigado. Antaŭ kelkaj semajnoj kanada esperantisto Matthew Orłowski komencis traduki kaj subtekstigi kelkajn el ili al Esperanto, kaj laŭ la pozitivaj spertoj nun li komencis produkti proprajn filmetojn kun Esperanta voĉo. La unua, 9-minuta filmeto, temas pri “Enkondukaj konoj pri la funkciado de la koro”. Estas aldonita ankaŭ la subteksto en Esperanto. La filmo estas trovebla en jutubo ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=hBpOgt5ldxs> kaj la ligilo kompreneble ankaŭ en la medicina sekcio de STEB ĉe <http://www.eventoj.hu/steb/> (Szilvási László, novaĵservo RET-INFO)



Refunkciigi informadon pri Esperanto en Suda Afriko

En la kadro de la laboroj por refortigi la landajn asociojn en la briks-landaro (Brazilo, Rusio, Barato, Ĉinio kaj Sud-Afriko), oni alvenis al pretigado de flugfolio en la afrikansa kaj en la angla, kiun oni volas presi en 1000 ekzempleroj kaj disvastigi tra Suda Afriko. Se estos pozitiva reago de la ricevontoj, oni plupresos kaj daŭrigos ankaŭ en aliaj sudaafrikaj lingvoj. Intertempe oni ankaŭ komencos informan agadon en Facebook por sudaafrikanoj. Cetere, similan informan agadon en Butano laŭ siatempaj interparoloj estas jam prizorgata. Helpi al tiu ekefunkciigo de informado pri Esperanto en Suda Afriko oni povas per pago al la konto 'informado' ĉe UEA per la kutimaj pagmanieroj (<http://www.uea.org/alighoj/pagmanieroj>) kun la indiko 'por Suda Afriko'.

(Renato Corsetti)



KERo 2016 sukcese okazis en Kubo

En marto okazis en la feriejo Arcoiris, en la centra provinco Villa Clara, la kuba Esperanto-renkontiĝo KER-o 2016 kun partopreno de 72 geesperantistoj el la tuta lando, aktivuloj kaj estraranoj de KEA. Okazis foruma plenkunsido cele al interŝanĝo pri la nunaj defioj de la asocio, plialtigi la membraron, aktivula trejnado, kursoj, informa laboro, kulturaj eventoj, eksterasocia reprezentiĝo kaj eventoj de la jaro. Sekvis bunta programo de la renkontiĝo, kiu dividis la tagojn laŭ fakoj, unue la tago de instruado kaj tago de kulturo, okazis kunsido de la kuba ILEI-sekcio, KEA-ekzamenoj, debato pri La bona lingvo, prelegoj pri kulturklerigaj temoj, filmoprezentado, radioamatoroj, konkurso literatura, balo, kaj ekskurso al la urbo historia Santa Clara.

(Maritza Gutiérrez, retgrupo landa agado)

Zamenhof kaj Shakespeare

La 23-a de aprilo markas la kvarcentan datrevenon de la morto de William Shakespeare – kaj la 452-an de lia naskiĝo: li naskiĝis kaj mortis en la sama tago de la jaro. Okaze de ĉi tiu duobla datreveno, en la novaĵretejo *La Balta Ondo* aperis artikolo “Zamenhof kaj Shakespeare” de Humphrey Tonkin, kiu estas publikigita en la aprila-maja kajero de “La Ondo de Esperanto”. La artikolon garnas la Zamenhofa traduko de la monologo de Hamleto “Ĉu esti aŭ ne esti”: <http://sezonoj.ru/2016/04/shakespeare/>

Poliglota renkontiĝo en Berlino: Poliglotoj ŝatas Esperanton

En majo okazis en Berlino la tre sukcesa ‘Poliglota renkontiĝo’ (*Polyglot Gathering*, www.polyglotberlin.com), jam trian fojon organizita de esperantistoj, la multlingvulino Judith Meyer kaj de la inicinto de la esperantlingva Vikipedio, Chuck Smith kaj ilia teamo. La ĉi-jaran aranĝon partoprenis ĉ. 350 personoj, kaj dekoj ne povis aliĝi en la lastaj tagoj pro manko de loko. Laŭ la raportinto Sylvain Lelarge (mallongigite): La aranĝo montriĝis miksaĵo de junulara E-aranĝo kaj lingvistika konferenco, spertintersanĝo. Multaj el la 350 multlingvuloj estis impresaj homoj, kiuj pasie kaj ofte profesie dediĉas sin al la lingvolernado kaj pioniras multdirekte. Ĉiu el ili certe scias pri Esperanto, ofte interesiĝas pri ĝi, multkaze lernas ĝin, almenaŭ pritraktas ĝin kiel ĉiujn aliajn lingvojn. Observeblis ke pli-malpli triono de la publiko kapablas uzi ĝin. Mi mem donis fulmkurseton por kelkaj partoprenantoj, kiuj ricevis ankaŭ nian libron *Poŝamiko* por la unuaj paŝoj. Kvankam la angla estis la dumkunvena pontlingvo, uziĝis Esperanto en multaj komunikaj situacioj, konversacioj, eĉ en la vespera kvizkonkurado. Inter la multnombraj prelegoj du okazis parte en Esperanto: ‘Komparado de la tri plej facilaj lingvoj: la sveda, la indonezia kaj Esperanto’ (Charlotte Scherping Larsson, svedino kiu eklernis Esperanton pasintan decembron), ‘Kukumio: lingvopolitika ludo’ de Konstanze Schönfeld. Kiam oni pro troa aŭskultado laciĝis, ĉiam eblis iri teon trinki kun novaj amikoj al la [en Esperanto nomita] ‘gufujo’ aŭ danci dum la koncerto de JoMo.

(SylvainLelarge,<http://edukado.net/novajhjoj?id=621>).

Seslingva reta versio de la kurso: Zagreba Metodo

Aperis reta versio de la kursmaterialo de Zagreba Metodo. Georg Jähnig ellaboris retejon kaj kun la permeso de la aŭtoro de la materialo Zagreba Metodo aperigis interagan version de la kurso. La 12 lecionoj de la libro alireblas en ses lingvoj: la germana, angla, franca, hispana, ĉina kaj malajzia. Ĉe la unuopaj lecionoj la lernantoj povas vidi kaj aŭskulti en bona prononco la tekston, povas trovi ankaŭ la novajn vortojn, klarigojn pri la rilata gramatiko kaj solvi kelkajn interagajn ekzercojn. Al la lecionoj aldoniĝas ankoraŭ kelkaj resummaterialoj, ekz. la korelativa tabelo, listo de prepozicioj, afiksoj kaj kelkaj laŭtemaj vortlistoj. En la vortostoko de la materialo eblas serĉi laŭ la ses lingvoj. La programo estas libere uzebla kaj komputile kaj en modernaj aplikajoj, kiel saĝtelefonoj. Vidu ĝin ĉe learn.esperanto.com/.

(<http://edukado.net/novajhjoj?id=620>)



Nova rektmetoda kurso senpage elŝuteblas por Android-telefonoj

La aplikajo por lerni Esperanton, kiun la Internacia Esperanto-Instituto en Hago lanĉis post stadio de testado kaj korektado, jam senpage elŝuteblas ĉe Google-butiko (<http://www.play.google.com/>) kaj estas trovebla ankaŭ ĉe pli simpla plusenda adreso: www.iei.nl/apo.htm. Ĝi estas bazita sur la tre konata Esperanto-kurso “Esperanto per rekta metodo” de Stano Marček (volumo 1, lecionoj 1 ĝis inkl. 11). Piet Buijnsters, la programisto, uzis por ĝi la tre trafajn kaj instruajn desegnaĵojn de Linda Marčeková el la kursolibro, kaj kiam oni klakas aŭ tuŝas la tekstojn de la kurso, oni tuj povas aŭdi la klaran prononcadon. La kurso por lerni Esperanton funkcias per bildoj, vortoj kaj frazoj, de simpla al kompleksa strukturo, sen uzi naciajn lingvojn. La gramatikaj reguloj kvazaŭ ludante aperas.

(<http://edukado.net/novajhjoj?id=619>)

Vortbeleco en Esperanto

La 18-an de aprilo 2016 okazis en Vroclavo la unua festivalo de deklamata poezio “Vortbeleco en Esperanto”. La festivalon preparis Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo, Pola Esperanto-Asocio kune kun neesperantista organizaĵo “HORIZONTO”. La publikon kaj la partoprenantojn salutis la prezidantino de la Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo Małgosia Komarnicka, kiu prezentis la historion de Esperanto. La festivalon gvidis la aŭtorino de la projekto Halina Kuropatnicka-Salamon. La partoprenantoj de la festivalo



estis diversaĝaj kaj plimulto el ili ne estis esperantistoj. Ĉiu partoprenanto prezentis unu poeziaĵon en Esperanto. La prezentadon prijuĝis ĵurio: Lidia Ligęza, Małgosia Komarnicka kaj Andrzej Kraszewski (sur la foto), kiu pritaksis interpretadon, elekton de la temoj kaj parolmanieron. La unuan premion ricevis Wojciech Ławnikowicz, la duan Monika Radomska kaj la trian premion Magdalena Piętko. La premiitoj ricevis diplomojn kaj donacojn kaj ĉiuj partoprenantoj ricevis diplomon pro la partopreno. Sumigante la aranĝon la organizantoj konstatas, ke la strebo popularigi Esperanton kaj vigligi la kunlaboron kun neesperantistaj medioj, precipe en ĉi jaro, dum kiu Vroclavo estas la Kulturĉefurbo de Eŭropo 2016, bone fruktis.

(Retgrupo landa agado, Małgosia Komarnicka)

Kaj en Esperanto?

Ekzistas diversaj sistemoj, ekzemple Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj praktikas literuman alfabeton, kiu tre similas al la ICAO-alfabeto uzata en aviado – ekz.: alfa, bravo, ĉarli. Alia sistemo estas de nekonata fonto (ŝajne el la vortaro Germana-Esperanto de Erich-Dieter Krause) – ekz.: asfalto, barbaro, centimetro. (https://eo.wikipedia.org/wiki/Literuma_alfabeto)

Nova redaktoro por la revuo *Esperanto*

El ses kandidatoj por sekvi Fabrício Valle kiel redaktoro de la revuo *Esperanto*, la estraro de UEA elektis la 47-jaran hungaron Attila Kaszás. Li estas diplomita esperantologo, historiisto, politologo, kaj li laboras en Budapeŝto kiel konsultanto kaj manaĝisto. Kaszás aliĝis al la Esperanto-Fako de la Universitato ELTE en Budapeŝto, kaj fariĝis tre aktiva en la junulara movado de la 1990-aj jaroj. Kiel estrarano de Hungara Esperanto-Junularo kaj TEJO li kunorganizis multajn junularajn renkontiĝojn kaj trejnseminariojn. Dum la

renkontiĝoj li ofte verkis kaj reĝisoris humurajn skeĉojn kaj kunredaktis eldonaĵojn. Poste li fondis Esperanto-familion, en kiu naskiĝis unu filo. Kaszás laboris ĉe registaraj instancoj, NRO-oj kaj komercaj entreprenoj en diversaj kampoj, kiel ekz. junularpolitiko, ekologia mastrumado kaj internaciaj rilatoj. Li nun faras doktorajn studojn pri elektronika demokratio, estas membro de la hungara UNICEF-komisiono kaj estrarano de la Asocio de Eŭropaj Baloto-Spertuloj. Li krome ellernis pro pasio 14 lingvojn ĝis nun, kaj multe vojaĝis. Li transprenas la redaktadon de la revuo *Esperanto* ekde la maja numero ĉi-jare. (www.uea.org)

Probal Dasgupta – nova prezidanto de la Akademio de Esperanto

Estas elektitaj novaj estraranoj kaj direktoroj de la Sekcioj kaj Komisionoj de la Akademio de Esperanto. La nova prezidanto iĝis Probal Dasgupta. Li ekoficas anstataŭ la antaŭa prezidanto Christer Kiselman, kiu eksprezidantiĝis en decembro 2015. Dasgupta estas la dua eksprezidanto de UEA (la unua estis John Wells), en la rolo de la prezidanto de la akademio. Probal Dasgupta estas barata esperantisto kaj leksika esploristo, doktoriĝis en Novjorka universitato, estas honora membro de la Lingvistika Societo de Usono kaj instruis lingvistikon en tri barataj universitatoj; estis direktoro de la universitato de Hajderabado kaj tiea dekanato pri humanistiko. Krome anos en ĝi du vicprezidantoj Brian Moon kaj Otto Prytz, kaj la sekretario Renato Corsetti. Kiel aliaj direktoroj estis elektitaj Orlando Raola (faka lingvo), Sergio Pokrovskij (gramatiko), Markos Kramer (ĝenerala vortaro), Anna Lowenstein (kontrolado de lerniloj), Alexander Shlafer (lingva konsultejo), Paul Gubbins (literaturo), Carlo Minnaja (historio de la Akademio) kaj Nguyen Xuan Thu (homaj nomoj).

(<http://sezonoj.ru/2016/04/akademio-4/>; liberafolio.org)

La Ondo de Esperanto por legiloj, platkomputiloj kaj saĝtelefonoj (ePub)

La redakcio de “La Ondo de Esperanto” ekde 2007 proponas elektronikan abonon en la populara dosierformo pdf. Nuntempe pli ol kvarono da abonantoj preferas ricevi la revuon ne papere, sed kiel pdf-dosieron. Ĉar por posedantoj de librolegiloj, saĝtelefonoj kaj negrandaj platkomputiloj la legado de A4-formata pdf-revuo ne estas oportuna, speciale por ili la redakcio de “La Ondo de Esperanto” ĵus enretigis provnumeron de la marta numero laŭ la normo ePub (*Electronic Publication*). Oni povas senpage elŝuti la ePub-revuon kaj legi ĝin helpe de pluraj aparatoj. La kvalito de la surekrana bildo en

poŝtelefonoj kaj platkomputiloj dependas de la uzataj legoprogramoj. Sufiĉe bone ePub estas prezentata per iBooks en iPad, iPhone kaj aliaj aparatoj de Apple. La legoprogramoj *FBReader*, *AlReader* kaj *CoolReader* prezentas ne ĉiujn eblojn de ePub. La posedantoj de la aparatoj, kiuj funkcias kun Android, povas uzi la programeton *ePub Reader*. Legu pli en la retejo

La Balta Ondo, <http://sezonoj.ru/2016/04/ondo-9/>

LabourStart ricevis premion pri sindikataj rajtoj

LabourStart estas novaĵ- kaj kampanjo-retejo de la internacia sindikata movado, kiu ekde kelkaj jaroj ankaŭ uzas Esperanton. La fondaĵo Arthur Svensson en Norvegio anoncis, ke la ricevanto de la jara premio pri sindikataj rajtoj estas Labourstart. La antaŭaj ricevantoj de la premio estis Mahdi Abu Dheeb et Jalila al-Salman (Barejno), Napoleon Gomez Urrutia (Meksiko), Valentin Urusov (Rusio), la C.CAWDU (Kamboĝo), Shaher Sae'd (Palestino) kaj Wellington Chibebe (Zimbabvo). La premio de 63.000 eŭroj estis kreita de la sindikato Industri Energi kaj celas promocii kaj fortigi sindikatojn kaj ties rajtojn internacie. La ceremonio okazas en Oslo la 15an de junio.

(<http://www.labourstart.org/>); (<http://svenssonstiftelsen.com/en/the-arthur-svensson-prize-awarded-to-labourstart/>)

55-a fondodatreveno de Radio Havano Kubo

La 21-an de aprilo en la sidejo de la kuba asocio de UN okazis ceremonio okaze de la 55-a fondodatreveno de Radio Havano Kubo, kie diversaj redakcioj partoprenis. Reprezentantoj de Kuba Esperanto-Asocio transdonis ateston por rekonii kaj danki la radiostacion, kiu akceptis esperantlingvan elsendon jam en septembro de 1988, kaj ĝi daŭre estas unu el la 8 lingvoj de Radio Havano kun sama rajto kaj konsideroj. Kubaj gejunuloj prezentis kanton en Esperanto. La eventon partoprenis membroj de la asocio de UN, diplomatoj, ĵurnalistoj, invititoj de la kuba asocio de karibaj landoj kaj asocioj amikaj al Kubo.

(<http://www.radiohc.cu/eo>)
(<http://www.ameriko.org/radiokubo>)

Grandvoluma medicina oklingva vortaro aperis

En aprilo 2016 aperis *Oklingva medicina enciklopedia vortaro (Osmojezični medicinski enciklopedijski rječnik)* de la aŭtoro Jozo Marević el Velika Gorica. La eldonisto estas Marka el Velika Gorica (Kroatio), kaj sur 3.200 paĝoj (21x30 cm) prezentitaj estas 50.000 vortoj, esprimoj kaj



mallongigoj. La menciitaj ok lingvoj estas la latina, kroata, angla, germana, franca, itala, hispana kaj Esperanto. Intervjuon kun la aŭtoro Marević faris D. Klobučar por *Eŭropa Bulteno* (<http://www.europa.eu/euhropa-bulteno>). Pli pri la afero legeblas en la portalo de Kroatia E-Ligo:

http://www.esperanto.hr/lagado_oklingva.htm.

La Estraro de UEA kunsidis en Roterdamo

La Estraro de UEA kunsidis dum tri tagoj en aprilo en la Centra Oficejo en Roterdamo. Temas pri la unua kunsido, gastigita de la nova Ĝenerala Direktoro Veronika Poór, kaj la lasta kunsido de la nuna estraro, kies mandato finiĝos post tri monatoj dum la 101-a UK en Nitro. Unu estrarano, Stefano Keller, iom antaŭtempe forfalis de la teamo, ĉar li sendis demisian leteron en la tago antaŭ la kunsido. La kunsido pritraktis multajn temojn, kiel ekzemple: Modernigo plurflanka (nova Strategia Plano, modernigo de la Statuto, plisimpligo de la kotizsistemo) - Preparoj por la Zamenhof-Jaro 2017 - Fokuso al la Jaro de la Lernanto - Apoga rolo de UEA por landoj kaj regionoj. (*La Balta Ondo*, <http://sezonoj.ru/2016/04/uea-2/#more-8695>)

KAEST 2016 invitas

KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), organizata ĉiun paran jaron, okazos ĉi-jare la 17-20-an de novembro en Modra (Slovakio). La ĉeftemo de KAEST 2016 estas "Avantaĝoj kaj obstakloj de moderna komunikado". La temo estas tre aktuala kaj trafa, ja E@I, kiu ĉeforganizas la konferencon, okupiĝas pri modernaj teknologioj ekde sia ekesto. Krome, dum lastaj jaroj ĝi ankaŭ kunlaboras pri projektoj, rilataj al kiberia ĉikanado. La programo konsistas el kelkaj partoj: prelegoj, trejnado, fakaj diskutoj, vespera (neformala) programo, ekskurso (laŭ interkonsento kaj mendoj). E@I-teamo invitas aliĝi kaj prelegi, aŭ simple aliĝi kaj ĉeesti en KAEST 2016. Legu pli: <http://kaest.ikso.net>. (*La Balta Ondo*, <http://sezonoj.ru/2016/03/kaest>).

Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher

Medienecho

Ich bedanke mich herzlich für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an, damit sie nicht im Spam-Ordner landen.

Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, werden in dieser Zusammenstellung nicht berücksichtigt.

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die mir aber selber vorliegen, wird hingewiesen. Diese sende ich Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zu. Anfragen an "medienecho@esperanto.de" - Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

**Alle Beiträge sind jetzt wieder aktuell auf den Seiten des DEB zu finden:
<http://www.esperanto.de/de/medienecho>**

Unser neuer URL-Verkürzungsdienst espo.link ersetzt eine lange, umständlich einzugebende URL durch eine kurze. Nutzen Sie ihn als "Umleitung" zur richtigen Adresse. Mehr Informationen darüber finden Sie unter espo.link/info.

12. Mai 2016 WAZ

Kooperation denkbar
Warstein. Bei ihrem letzten Treffen hatte der Rotary Club Meschede-Warstein unter seinem Präsidenten Dr. Rolf Cramer den Warsteiner Otto Nelken eingeladen. Nelken hielt ein Referat zum Thema "Rotary und Esperanto – zwei erfolgreiche Wege zur Völkerverständigung".

espo.link/163171

espo.link/163172

11. Mai

Süddeutsche Zeitung

Wenn alle eine Sprache sprechen (von Andreas Ostermeier)

Karl Breuninger organisierte am vergangenen Pfingstweekende einen Esperanto-Kongress in München. Mit der Veranstaltung wollte er auch um Nachwuchs werben.

Wenn es stimmt, dass eine Sprache der Zugang zu einer Kultur ist, dann hat Karl Breuninger Zugang zu ganz vielen Kulturen. Nicht weil der Germeringer ein Sprachengenie ist. Er selbst hält sich eher für wenig begabt, was das Erlernen neuer Sprachen angeht. Aber weil der 71-Jährige Esperanto spricht. Diese Kunstsprache beherrschen außer ihm noch ein paar Millionen Menschen auf der Erde - und sie leben in nahezu allen Ländern und Kulturen. Das ist ein Grund, weshalb Breuninger die Sprache schätzt, die vor etwa 130 Jahren ihre Regeln bekam.
espo.link/163173

11. Mai

Süddeutsche Zeitung

Warum die Esperanto-Hauptstadt "Parkurbo" nie gebaut wurde (von Martin Bernstein)
"Ein Familienparadies im wahren Sinne des Wortes" sollte die Parkstadt werden, die Architekt Fritz Sievers 1912 am Ostufer der Würm gegenüber von Gräfelfing plante. Das eine Million Quadratmeter große Areal umfasste das Gebiet, das heute von der Allguth-Zentrale, dem Kieswerk Glück und dem Westteil Martinsried begrenzt wird. 500 Einfamilienhäuser waren projektiert, eine Kirche, ein Geschäftszentrum, ein Theater, ein Ferienhaus, ein Kasino, eine Bibliothek, ein Restaurant an der Würm und viel Grün. Das Startkapital war bereits vorhanden: rund zwei Millionen Mark. Und das alles sollte erst der Anfang sein. Denn die neue Stadt sollte die "Hauptstadt von Esperantujo" werden, der weltweiten Esperanto-Gemeinde. Die Kenntnis der 1887 von Ludwik Lejzer Zamenhof begründeten Plansprache durch mindestens ein Familienmitglied war Voraussetzung, um sich in der Gartenstadt "Parkurbo" niederlassen zu können.
espo.link/163174

9. Mai 2016

Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen

Wem gehört denn die Esperanto-Sammlung unter Signatur 17ZZ... in der Staatsbibliothek zu Berlin?
espo.link/163181

5. Mai 2016

Aalen

Am Mittwoch konnte Oberbürgermeister Thilo Rentschler eine Auswahl neuerer Esperanto-Bücher im Wert von 200,- € von Alois Eder, dem Vorsitzenden des Esperanto-Landesverbandes Baden-Württemberg, entgegen nehmen. Die Bücher sind für die Nutzung in der Stadtbibliothek bestimmt und sollen insbesondere junge Menschen für die Sprache Esperanto begeistern. Sie können ab sofort entliehen werden.
espo.link/163182

4. Mai 2016

Heulermagazin

Eine Liebeserklärung an Esperanto
espo.link/163183

30. April 2016

Golem.de-Forum

“Warum ist Esperanto so selten”
Eine muntere Sammlung haarsträubender Vorurteile wartet auf Antworten:
espo.link/163184

29. April 2016

Hannoversche Allgemeine

Ideen für Pendlerstunden
u. a.: Esperanto lernen: Die leicht erlernbare Kunstsprache wurde für den Austausch zwischen verschiedenen Nationalitäten geschaffen. Die meisten Menschen brauchen etwa 40 Stunden, um Grammatik und rudimentären Wortschatz zu lernen. Für die Sprachpraxis kann man zu einer internationalen Esperanto-Veranstaltung pendeln.
(Seite bis zum Ende des Berichtes hinunter rollen.)
espo.link/163185

27. April 2016

Herzberg

Am Sonntag dem 24. April waren

zahlreiche Mitglieder der Einladung zur Jahreshauptversammlung der Esperanto-Gesellschaft Südharz gefolgt. Hierzu traf man sich in familiärer Runde im Esperanto-Centro in der Grubenhagenstr. 6. Nachdem der 1. Vorsitzende Peter Zilvar die Anwesenden begrüßt und einleitende Formalia abgehandelt hatte, ging er auf Aktionen und Vorhaben im Jahr 2015 ein.

Gegen Gebühr im Harzkurier: espo.link/163185
Zum selben Thema auf der Seite von Herzberg: espo.link/163186

27. April 2016

webdigital.hu

GMX Schweiz

Die Kunstsprache Esperanto soll sich für die Sprecher unterschiedlichster Muttersprachen leicht erschließen. Selbst ohne Kenntnisse können Sie vielleicht die Bedeutung mancher Sätze erraten....
Ein offensichtlich werbebasiertes aber trotzdem ganz nettes Quiz-Spielchen
espo.link/163187
espo.link/163188

23. April 2016

366 x grün

Kial Esperanto estas la lingvo por la verduloj?
Die intensiven Bemühungen von Sprach-Aktivist*innen, die Grünen vom Esperanto zu überzeugen, lassen sich in einer Mappe mit Briefen, Postkarten und Faltblättern nachvollziehen, die das Grüne Archiv vor kurzem von den Wiener Grünen übernommen hat.
<http://366xgruen.at/esperanto-sprache-der-gruenen>
Hier ein fünfsprachiges Faltblatt, das Antwort auf die Frage “Kial Esperanto estas la lingvo por la verduloj?” liefern soll.
espo.link/163189
Asocio de Verduloj Esperantistaj:
espo.link/1631810

18. April 2016

Kalenderblatt

Erste Esperanto-Konferenz
Prag, im Sommer 1921. Es herrscht Aufbruchstimmung bei den 3.000 Teilnehmern des “Universala Kongreso” - des Esperanto-Weltkongresses. Seit dem Ende des Ersten Weltkriegs

erlebt die Sprachbewegung einen Boom: Tausende Menschen strömen in Esperanto-Kurse, zahlreiche Schulen setzen die Sprache auf den Lehrplan.

espo.link/163191

18. April 2016

ARD Mediathek (5 Min.)

18.4.1922: Erste Esperanto-Konferenz
Sprache verbindet: Am 18. April 1922 forderten Delegierte aus 28 Ländern auf der ersten internationalen Esperanto-Konferenz, diese Kunstsprache an Schulen zu unterrichten. Ziel: Das Zusammenwachsen Europas zu fördern.

espo.link/163192

7. April 2016

web.de

l{°O°\/\3/\ \$13 l)4\$ £3\$3\/?

(Das ist kein Druckfehler!)

Wie unser Gehirn Leetspeak und Co. verstehen kann
Was haben Sie heute gem8? Unser Gehirn ist in der Lage, auch Wörter mit fehlenden oder vertauschten Buchstaben sinnvoll zu erfassen - wie in der Überschrift dieses Artikels, die mit Buchstaben geschrieben lautet "Können Sie das lesen?" Eine faszinierende und nützliche Fähigkeit, die trainiert werden kann.

Als "künstliche" Sprache findet hier Esperanto kurze Beachtung.

espo.link/1631913

31. März 2016

schwäbische.de

Aalen - Esperanto-Verband übergibt Bücher an Stadtbibliothek

Aalener Gruppierung will die Kunstsprache bekannter machen – Torhaus beherbergt Esperanto-Literatur

Alois Eder, Vorsitzender des Esperanto-Landesverbandes Baden-Württemberg, hat am Mittwoch Oberbürgermeister Thilo Rentschler eine Auswahl neuerer Esperanto-Bücher im Wert von 200 Euro übergeben. Die Bücher sind für die Nutzung in der Stadtbibliothek bestimmt und sollen insbesondere junge Menschen für die Sprache Esperanto begeistern. Sie können ab sofort entliehen werden.

espo.link/163194

31. März 2016

Hersfelder Zeitung

Esperanto-Treffen in Bad Hersfeld: Sprache ohne Grenzen

Bad Hersfeld. Sie kamen aus den Niederlanden, Belgien oder den USA: Rund 100 Esperantosprecher aus sieben Ländern trafen sich zur 32.

Frühlingswoche in der Jugendherberge Bad Hersfeld.

Die Teilnehmer der Familienfreizeit veranstalteten Ausflüge, besuchten Kurse und sprachen in ihrer gemeinsamen Sprache, dem Esperanto, miteinander.

espo.link/163195

23. März 2016

Kölner Stadt-Anzeiger

Die Welt

Focus

Südwest Presse

WN.com

heute.space

nachrichten.de

Esperanto-Fans lernen Kunstsprache zunehmend im Internet

Bad Hersfeld -

Die mehr als 100 Jahre alte Kunstsprache Esperanto findet nach Angaben des deutschen Verbandes immer neue Anhänger. "Es gibt eine wachsende Zahl von Interessierten. Man bekommt schnell Zugang auf Grund der einfachen Struktur der Sprache. Es gibt nur wenige grammatische Formen", sagte Louis von Wunsch-Rolshoven vom Deutschen Esperanto-Bund. Schon etwa 40 Stunden reichten, um sich eine Basis aufzubauen für den Austausch mit Esperanto-sprechenden Menschen weltweit.

Der Verband veranstaltet von Karfreitag an (25. März) bis 1. April eine Frühlingswoche, zu der sich über 100 Teilnehmer aus sieben Ländern angemeldet haben.

espo.link/163196

espo.link/163197

espo.link/163198

espo.link/163199

espo.link/1631910

espo.link/1631911

espo.link/1631912

Kompilis Hermann Kroppenber

Kalendaro

Julio 2016

09 – 10: Invito al unika jubileofesto (Alvoko): La

9-an de julio okazos jubilea festo en la kavalira salono de la Welf-kastelo en Herzberg. Posttagmeze okazos gvidadoj sur “Esperanto-itineroj” en la Esperanto-urbo. La 10-an de julio ni komune havos kradrostadfeston en la Esperanto-ĝardeno ĉe Interkultura Centro Herzberg. Se vi volas helpi por la fenomeno “Herzberg am Harz... la Esperanto-urbo”, aŭ se vi ŝatas partopreni ĝin, bv. aliĝi ĉe Peter Zilvar, ĉar ni devos ĉion detale kaj sufiĉe frue plani. Rete: zilvar@t-online.de



13 - 16: Multgeneracia Vilaĝo Esperanto – ĉiutaga informa Esperanto-stando dum Festivalo Woodstock en Kostrzyn ĉe la rivero Odra. Rektmetodaj kursoj (2x1,5 h kun Stano Marček), koncerto de JoMo, ekspozicio, kultura programo, diskutrondoj... Inf.: Centro de Interkultura Edukado - Nowy Sącz, Pollando, rete <http://www.cem.info.pl/?p=1505&lang=de>.

14 - 17: Somera Esperanto-kurso en Iisalmi, Finnlando. En la programo estos instruado 5-6 horojn tage en elementa kaj progresiga niveloj. Dum la libertempo ni konatiĝos kun la ĉirkaŭaĵo kaj la lokaj esperantistoj. Nia ĉefinstruisto estos Gražina Opulskienė el Litovio. Bonvenon lerni Esperanton en finna naturo! Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF), rete: eafsekretario@esperanto.fi

16 - 22: 27-a OSIEK-konferenco en Osijek, Kroatio. La urbo Osijek estas kandidato por kultura ĉefurbo de EU en 2020. Pri la temo “Landoj ĉe vojkruciĝo” prelegos M. Butan, G. Mihalkov, Spomenka Štimec, Zlatko Tišljar. Statuta programo, E-kursoj, libroservo, infanprizorgo, kultura kaj distra programoj, urbovizitoj,

naĝado en Copacabana(!) kaj termalbanejo, agrablaj kaj interesaj ekskursoj ekologiaj, kulturaj, historiaj... Komuna veturado tra Pécs kaj Budapeŝto (HU) al la 101-a UK en Nitra (SK), ĉ. 400 km. Info ĉe www.osiek.org kaj la loka organizanto: Orbis Pictus de Viŝnja Brankovič. Rete: [orbispictus\(ĉe\)iol.it](mailto:orbispictus(ĉe)iol.it); poŝtelefonoj: +385/99 50 11 912 (HR) + 39/327 98 300 86 (IT)

16 - 23: 72-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Wrocław, Pollando: <http://ijk2016.tejo.org>

16 - 23: 69-a Kongreso de IKUE en Nitra, Slovakio. La kongreso estos ligita al la Jubileo de la Mizerikordo. En la programo oni antaŭvidas ĉiutagajn komunajn preĝojn. Dum la kongreso oni aranĝos plurajn pilgrimojn. Informas: IKUE, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Marija Beloŝević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Rete: ikuekongreso@gmail.com

16 - 23: 66-a kongreso de KELI en Bratislava, Slovakio. Ĉiujara kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia, komunaj preĝoj, kantado, prelegoj, koncertoj, unu tuttaga kaj du duontagaj ekskursoj. Venu travivi semajnon en kristana medio. Temo de la kongreso: Ĉu vi komprenas, kion vi legas? Inf.: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CS-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio. Rete: polnickypavel@seznam.cz

16 - 23: 89-a SAT-Kongreso en Herzberg am Harz, Germanio, <http://sat89.esperanto-urbo.de>

19 - 23: Antaŭkongresa Ekskurso en Svitavy, Ĉeĥio. Oficiala aranĝo por partoprenontoj de la 101-a UK en Nitro; trarigardo de Svitavy kaj Esperanto-Muzeo, ekskursoj al Unesko-urboj Litomyšl kaj Olomouc, vesperaj kulturaj programoj. Inf.: Ĉeĥa Esperanto-Asocio (kunlabore kun UEA, ĈEA), nám. Míru 81/1, CZ-568 02 Svitavy, Ĉeĥio. Rete: cea@esperanto.cz

20 - 22: 20-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco, IMEK en Nitro, Slovakio. Medicinista kongreso en kunlaboro kun slovakaj kuracistaj asocioj, malferma ankaŭ al ne-medicinistoj. Temo de la konferenco: “Medicinistoj kaj tutmondiĝo – kiajn medicinistojn bezonas la nuna jarcento?”. Inf.: UMEA, umea@uea.org

23 - 30: 101-a Universala Kongreso de Esperanto en Nitro, Slovakio, www.nitra2016.sk





Interkona frandvespero, instruista trejnado, E-kursoj por komencantoj kaj komencintoj, prelegoj kaj atelieroj de konferencanoj, lingva festivalo, simpozio pri la konferenca temo, konferenca bankedo, distraj vesperoj, literatura kafejo, kurso de baladaj ĉendancoj, ekskursoj. Busveturo Nitro - Nyíregyháza post la fermo de UK. Inf.: LKK de 49-a Konferenco de ILEI, Radojica Petrović, Bul. Oslobođenja 36, RS-32000 Čačak, Serbio. Rete: radojica.petrovic.rs@gmail.com, <http://www.ilei.info>

23 – 30: 45-a Internacia Infana-Junula Kongreseto en Nitro, Slovakio. Renkonto por infanoj kaj adoleskantoj samtempe kaj samloke kun la Universala Kongreso. Ĝia programo celas amuzi la infanojn kaj instigi ilin paroli Esperanton. Inf.: Veronika Acsádi kaj la skipo infana: kongreseto@gmail.com

25: Interreligia Forumo en Centra Eŭropo - CEIF 2016 en Nitro, Slovakio. La renkontiĝo estos la kontribuo de Slovakio por plifortigi la dialogon inter religioj, komuna serĉado de solvoj de kreskanta interetna, interkultura kaj interreligia tensioj, konfliktoj estigantaj nacionalismon, ekstremismon, ksenofobion, reziston kaj timon de loĝantoj kaj komplikajn ekonomiajn, socialajn kaj sociajn problemojn en la mondo, nuntempe ĉefe en EU pro nekontrolita alveno de multaj migrantoj. Inf.: Slovakia Esperanta Federacio kaj civita asocio, Parlamento de Mondaj Religioj, Slovakio. Rete: info@parlament2017.sk

28 – 29: Lingvopolitika Konferenco de Landoj V4+ en Nitro, Slovakio. Temo: Perspektivoj de lingva komunikado en EU. Partoprenos politikistoj, lingvistoj k.a. Malferma, sub aŭspicio de M. Lajčák, vicĉefministro, ministro de eksterlandaj kaj eŭropaj aferoj de Slovakio. Sur la listo de aranĝoj de la Slovaka Prezidenteco en la Konsilio de EU. Inf.: SKEF, EEU. Rete: jozef.reinvart@esperanto.sk

29 jul – 01 aŭg: ABELO - Apud-Berlina Esperanta Ludado en Berlino, Germanio. Nova semajnfina renkontiĝo por ludemuloj apud Berlino. Kune memzorga kun ludado ene kaj ekstere, naĝado, kafoklaĉado, loĝado en simpla naturamika domo. Inf.: Jessica Grasso kaj aliaj, rete: abeloabeloabelo@gmail.com

30 jul – 06 aŭg: 49-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en Nyíregyháza, Hungario. Konferenca temo: “Novaj vojoj de lernado”. Okazejo: Universitato de Nyíregyháza. El la programo:

31 jul – 05 aŭg: 8-a boatado sur la rivero Kupa en Karlovac, Sisak, Petrinja, Kroatio. Tradicia boatado kun motoroj kaj kajakoj, 5 etapoj, 130 km, ludoj, kursoj: Esperanto, fiŝkaptado kaj stiri boaton + kulturaj programoj. Inf.: Esperanto societo Sisak, Lonjska 74, HR-44 000 Sisak, Kroatio. Rete: esperanto.sisak@gmail.com

Aŭgusto 2016

02: Ekskurso al naskiĝloko de Kalocsay, al la vilaĝo Abaujszántó, kun la partoprenantoj de la Internacia ILEI-Konferenco. Inf.: Pásztor Lászlóné Adrienn, rete: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu, tel: +36-70-5708895

04 – 05: ILEI-simpozio “Novaj vojoj de lernado” en Nyíregyháza, Hungario. La simpozio okazas enkadre de la 49-a konferenco de ILEI en Universitato de Nyíregyháza. Ĝi estas inkluziva por esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj pri la temo de la simpozio. Laborlingvoj: Esperanto, hungara kaj angla kun tradukoj. Inf.: Radojica Petrović, Bul. Oslobođenja 36, RS-32000 Čačak, Serbio. Rete: radojica.petrovic.rs@gmail.com, <http://www.ilei.info>

05 – 14: SEFT, Somera Esperanto Familia / FERIA Tendaro en Thomsdorf, Germanio. La lingvo de SEFT estas Esperanto. SEFT ne havas fiksitan programon. Nur okazas tio, kion la partoprenantoj mem aranĝas. Ni helpas unu la alian kaj ferias komune. Inf.: tlustulimu@web.de

06 – 13: SOMERAS, Esperanto-studad-semajno post FESTO en Baugé, Francio. 5 Esperanto-kursoj (niveletoj A1-C1) kun prelegoj, koncertoj kaj aliaj



aktivajoj, opcie tuttaga ekskurso. Studad-semajno kun Mikaelo Bronŝtejn, Tim Morley, Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein, Marion Quenut. Inf.: Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Tel.: +33-2.41.89.10.34. Rete: kastelo@gresillon.org

20 – 27: 83-a Itala Kongreso de Esperanto en Frascati, Italio. Abundos prelegoj, muzikaj prezentoj kaj ekskursoj al centr-italaj turismaĵoj. Kompreneble Romo el nia vidpunkto povas esti konsiderata periferio de Frascati, kaj tie nin akceptos la papo en ĝenerala aŭdienco. Ni kaj 250 aliaj kongresanoj el la tuta mondo atendas vin. Inf.: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano, Italio. Rete: kongreso@esperanto.it aŭ iej@esperanto.it

21 – 28: 6-a Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj en Baugé, Francio. Ludoj, banado, manlaboroj, sporto, muziko kaj Esperanto-kursoj. Semajno por prepari la novan lernojaron kun Elisabeth Barbay, Ansofi Markov, Jean-Luc Kristos, Nicky Janssen... Inf.: Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Tel.: +33-2.41.89.10.34. Rete: kastelo@gresillon.org

27 – 28: 9-a Somera Universitato de la politika movado “Eŭropo Demokratio Esperanto” en Greziljono, Francio. Inf.: Federacio EDE, bertox@free.fr

Septembro 2016

09 – 11: 4-a Esperanto sur la strando en Gdansk-Sopot, Pollando. Krom la turisma kaj socia programo, ĉi-jare renkontiĝo dediĉita al historio de a plej fama triptiko de Hans Memling “Lasta Juĝo”. Inf.: Triurba Esperantista Asocio TORENTO, PL 81824 Sopot, str. Armii Krajowej 94, Pollando. Rete: torentosopot@wp.pl

14 – 23: 49-a Internacia Esperanto-Feriado en Duszniki Zdrój, Pollando. Inf.: Silezia Esperanto Asocio, rete: pomer@wp.pl

16 – 19: Beneluxa Kongreso 2016 en Lier, Belgio. Varia programo kun kursoj kaj prelegoj en ĉarma urbeto Lier atendas vin! Inf.: Flandra Esperanto-Ligo, rete: nicky24@telenet.be

23 – 25: 32-a ARKONES, ARTaj KONfrontoj en ESperanto en Poznań, Pollando. Sendependa kultura kaj arta esperantista aranĝo. Inf.: tobiasz@esenco.org

29 sept – 02. okt: MKR – MontKabana Renkontiĝo en Isola Santa, Toskanio, Italio. La aranĝo por montmigrantoj kaj naturemuloj! Inf.: Enrico Gaetano Borrello, rete: [enrico.gi.bi\(ce\)virgilio.it](mailto:enrico.gi.bi(ce)virgilio.it)

30 sept – 03 okt: 16-a KoKoLoRES – Kafoklaĉo kaj Ludoj dum RENkontiĝo Semajnfina en Schwerte, Ruhr-regiono, Germanio. La aranĝo por ludemuloj, sed ne nur, laŭbezone okazos kurso por komencantoj. Inf.: Petra Dückerhoff, rete: [petra.dueckershoff\(ce\)esperanto.de](mailto:petra.dueckershoff(ce)esperanto.de)

30 sept – 03 okt: TORPEDo 11 en Herzberg am Harz, Germanio. Pedagogiaj Tagoj, 75-a Studsesio: studmodulo pri didaktiko, metodiko, instrukapabligaj trejnado. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, klerigejo de GEA, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

Oktobro 2016

09 – 14: 6-a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA) en la okcidenta parto de la Palatinata Arbaro. La tranoktejo estos Tagungshaus Maria Rosenberg en Waldfischbach-Burgalben, Rosenbergstraße 22. Diversaj migradoj en la orienta parto de la Palatinata Arbaro, i.a. al la Heildsburg, Dahner Burgenland, japana ĝardeno Kaiserslautern. Detala programo ĉe Wolfgang Bohr: wolfgang.bohr@esperanto.de, <http://www.esperanto.de/de/ema>



Pliaj informoj ĉe:

<http://www.eventoj.hu/2015.htm>
<http://www.esperantoland.org/renkontighoj/>

Staatsbibliothek zu Berlin: Wem gehört denn die Esperanto- Sammlung unter Signatur 17ZZ... ?

? ... diese Frage wurde kurz vor dem Deutschen Esperanto-Kongress gestellt und dann an verschiedene Mailadressen versendet, darunter auch eine Adresse bei yahoogroups.de. So ist also anzunehmen, dass Öffentlichkeit gesucht wurde. Mit Rücksicht auf den Datenschutz nenne ich nicht den Namen des Urhebers, nehme mir aber die Freiheit, mehr oder weniger öffentlich darüber zu informieren, zumal es meiner Ansicht nach alle Leser (Mitglieder des D.E.B.) betrifft.

Die genannte Esperanto-Sammlung ist seit 1936 Bestandteil der Preußischen Staatsbibliothek Berlin und deren Nachfolger, und wird geführt als separate Sammlung, untergebracht in einem Außenmagazin¹.

Will man über Besitzverhältnisse diskutieren, so ist sicherlich neben historischem auch juristischer Sachverstand vonnöten – beides will ich mir nicht anmaßen – ich beschreibe es daher mal so, wie ich es weiß und für richtig halte. Einen kurzen Blick zurück halte ich auf jeden Fall für angebracht:

Am 12.11.1908 gründete Dr. Albert Schramm in Dresden das Sächsische Esperanto-Institut. Zum Institut gehörte auch die Königlich-Sächsische Esperanto-Bibliothek. Zuerst war Schramm Regierungsassessor, wurde aber 1913 als Museumsdirektor nach Leipzig berufen. Also zog die Sammlung mit ihm zusammen nach Leipzig.

Wenn man in der Festschrift "Das Esperanto, ein Kulturfaktor" von 1914 die Formulierung "dem Staat gehörige Esperanto-Bibliothek" liest, dann dürfte das wohl eher Propagandasprache und nicht unbedingt eine juristisch gesicherte Tatsache beschreiben.

Bedeutender finanzieller Förderer war der Industrielle Dr. Albert Steche, der sich als Abgeordneter der Sächsischen Ständekammer wiederholt für erfolgreiche staatliche Zuschüsse einsetzen konnte.

Aufgaben des Esperanto-Institutes waren: die Materialsammlung, um Auskünfte zu erteilen über Esperanto-Organisationen, Prüfungsanforderungen und -kommissionen, über Unterrichtsmaterial, sprachliche Fragen und die weltweite Verbreitung der Sprache. Dazu gehörte auch das Sammeln von Quellen für wissenschaftliche Arbeiten und die Erfassung von wissenschaftlichen Arbeiten in und über Esperanto.

